

Heinrich Heine,

## La Sileziaj teksistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe siaj teksiloj la dentojn grincante  
 Sidadas teksistoj jen, ne plorante:  
 Ni teksas trioblan malbenon por vi  
 En vian morttukon, Malnov-Germani'.  
 Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, al kiu pro nia  
 Mizero ni preĝis en kredo pia;  
 Ja vane esperis, atendis ni,  
 Nin mistifikis kaj trompis Li.  
 Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi reĝ' de l' riĉuloj,  
 Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,  
 Ĉantaĝas la lastajn groŝojn el ni,  
 Kiel hundojn nin pafmortigas li.  
 Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,  
 Kie nur prosperas la koterio,  
 Kie estas rompata ĉiu juna flor',<sup>3</sup>  
 Kie regas de l' putro la odor' -  
 Ni teksas, ni teksas!

...

---

<sup>3</sup>Kie frue rompatas ĉiu flor',

Navedo flugas kaj krakas teksil',  
 Ni teksas senlace dum nokta trankvil' –  
 Morttukon ni teksas, Germanujo, por vi,<sup>4</sup>  
 Enteksas trioblan malbenon ni,  
 Ni teksas, ni teksas.

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05-31.*

*MR-347-2-1 / Arg-240-489 (2004-06-02 11:46:37)*

*Esperantigo laŭ la dua germanalingva teksto, kiu estis – kun la rimarkigo “de la poeto reviziita” - eldonita en 1846 de H. Püttmann en la volumo “Album. Originalpoesien” (= “Albumo. Originaj poeziaĵoj”). [Laŭ interreta informo de l' 27.05.2004 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf, s-ino Marianne Tilch.]*

---

<sup>4</sup>Morttukon, ni teksas por vi, Germani',  
 Trioblan malbenon enteksas ni.